

ĈEA-Retkomunikoj 2017/06

Estimata leganto,

permesu al ni saluti vin en tempo antaŭ Kristnasko. En tiu ĉi numero ni ŝatus informi vin pri interesaj ligiloj al multmediaj novaĵoj, sed ankaŭ pri unu grava informo rilate al Esperanto-Muzeo en Svitavy. Do, agrablan legadon!



Multmediaj novaĵoj

1. Aktualaĵoj en la ĈEA-retejoj

1.1 Ĉeĥlingvaj artikoloj

[Zamenhofŭv rok 2017 vrcholí 15. prosince Dnem esperantské knihy](#)

- [Oficiální tisková zpráva ke Dni Zamenhova a Dni esperantské knihy](#)
- ... [Regionální varianta pro Olomouc](#)
- ... [Regionální varianta pro Brno](#)

[15. prosinec - Zamenhofŭv den](#)

[Internetové rádio Kern.punkto slaví tři roky](#)

1.2 Esperantlingvaj artikoloj

Subtenu malriĉajn infanojn en Afriko

En tempo antaŭ Kristnasko ni volas aĉeti kristnaskajn donacojn por niaj geamikoj, familianoj, proksimuloj ktp ... Sed eble ne al ĉiu persono nepre devas plaĉi tiu vivo en konsuma stilo, konsuma societo. Kaj tiuj personoj prefere ŝatus fari ion bonan por malriĉaj homoj. Ni ŝatus en tiu ĉi aktualaĵo informi vin pri du eblaj projektoj.



Interreta radio Kern.punkto festas tri jarojn

Antaŭ kelkaj tagoj pasis tri jaroj de la fondiĝo de interreta projekto de esperanta radio [Kern.punkto](#). Kion ofertas tiu ĉi radio al siaj aŭskultantoj kaj en kio estas alia? Tion vi ekscios en sekva teksto.



Kristnaskaj kantaroj

[Konataj ĉeĥaj kantoj](#)

[Konataj kantoj el diversaj landoj](#) (kun ligiloj al melodio en MIDI-formato)

2. Artikoloj en ĉeĥaj amaskomunikiloj

[Esperanto, homaranismus. Zamenhofŭv univerzální jazyk i náboženství v Hergotu!](#) - [Wave.rozhlas.cz](#)

10.12.2017 - inkl. **radiointervjuo** kun Petr Chrdle

[Petr Chrdle - Ludvík Lazar Zamenhof: Jazyky a spiritualita info.dingir.cz](#) 15.12.2017

Petr Chrdle - 100 let od úmrtí dr. Ludvíka Zamenhofa, doufajícího vizionáře lidskosti *Židovské listy* 2017/43 - aperonta ĉi-semajne

[Libuše Kolářová - Pavla Dvořáková: Esperantisté pořádali adventní matiné](#) - *Písecký deník* 9.12.2017

(kun abundaj hipertekstaj ligiloj kaj fotogalerio)

3. Muzea paĝo ĉe Ipernity

Pli ol 2000 multimediaj dosieroj en 54 albumoj

Albumo Zamenhof

[Deklaracio pri homaranismo](#) - Ni ofte mencias ĝin - sed ĉu ni ĉiuj ĝin legis?

[Baldur Ragnarsson - Zamenhof - la unua grava verkisto en Esperanto](#)

[Vilmos Benczik - La esperanta literaturo tra la lupeo de kelkaj](#)

[lingvoteorioj kaj literaturkonceptoj](#)

[Hilda Dresen - Zamenhof \(poemo\)](#)

[Zamenhof - la kreinto de Esperanto](#) - mallonga filmo kreita kaj prezentita kadre de la 102-a UKo en Seulo

[Unu minuto da vintra poezio en zamenhofa traduko: Heinrich Heine - En nord' unu pino](#) - deklamas Pavla Dvořáková

[Pluraj novaj temaj fotoĵoj](#)



Albumo Kristnasko kaj vintra temaro

[Bildkartoj kaj videoj](#)

[Kantoj kaj tekstoj](#)

Novaj tekstoj:

[Kristnaskofesto en Pollando](#) - 55paĝa broŝuro

[Lidia Ryndina - Vespero antaŭ Kristnasko 1945 en Germanio](#) - el libro Rusa Kristnasko tradukis Hugo Westhoff. *Dio benu* 2017/4

Kristnaskaj muzikregistraĵoj

[Bim bom - sonas el ĉiel'](#) - kantas nederlanda ensemblo *Akordo*

[Sub frida vintra luno - Hurona karolo](#) - interpretas Pavla Dvořáková (tute nova registraĵo el 17.12.2017)

[Kristnaska kanto, originale verkita en Esperanto kaj kantata de la itala artistino Cristina Casella](#)

... kun belaj historiaj kristnaskaj bildkartoj

[Kristnaska grandkanto de la amo por dommastrinoj - Vánoční velepíseň lásky pro hospodyně](#) - dulingva inspira teksto

4. Novaj sonartikoloj de la [Esperanta Retradio](#)

Ĉiutage aperas nova kelkminuta programo pri iu interesa temo, kun paralela teksto por pli bona kompreno!



Novaj registraĵoj de Jaroslava Malá:

1. Granda katfabelo de Karel Čapek

- la [parto unu](#)

- la [parto du](#)

- la [parto tri](#)

[2. Ne tiom oro kiom salo valoras](#)

5. El nia historio - kion oni skribis kaj legis antaŭ jaroj

[Časopis českých esperantistů \(Gazeto de ĉeĥaj esperantistoj\)](#) - i.a. kun la rakonto "Tri reĝoj" de Jan Neruda

Esperanto-Muzeo en Svitavy PORTEMPE fermiĝos

Pro la rekonstrulaboroj en la Ottendorfer-Domo la muzeo fermiĝos je 28-a de decembro. La lasta tago por viziti la muzeon estos la 27-a de decembro, kiam okazos aranĝo pri geokaŝado je la 17-a horo. Supozata remalfermo estos post proksimume tri monatoj, precizan informon ni dissendos ĝustatempe.

Oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kreskas!

Jam preskaŭ kvin monatojn funkcias oficiala Vizaĝlibra paĝaro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Celo de la paĝaro estas informi vin pri novaĵoj de la esperanta movado en Ĉeĥio kaj en la mondo. La redakcia teamo klopodas preskaŭ ĉiun tagon oferti ion interesan! [Sekvu nin ĉe Facebook!](#)

Eventoj

Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos ne nur en Ĉeĥio:

28/12: Silvestra festo en Prostějov

Festu la finon de la jaro 2017 en klubejo de esperantistoj en Prostějov! Komenco je la 13-a horo.

Kontakto: dundeejarek@seznam.cz

29/12: Esperanta Silvestro

Ekde la 19-a horo en la malgranda salono de la Nacia domo /Národní dům/. Pli detalaj informoj:

[jk.esperanto@seznam.cz](mailto:j.k.esperanto@seznam.cz). Kaze, ke vi volas partopreni, skribu al kovar.lad@email.cz.

26/12-02/01: JES - Junulara E-Semajno 2017

Tradicia esperanta [aranĝo](#) de junaj geesperantistoj (en kunlaboro de pola kaj esperanto junularoj).

4-7/01: Poludnica 2018

Tradicia – jam [la 36-a!](#) – [vintra renkontiĝo de esperantistoj](#) – vojaĝantoj kaj turistoj, nomita laŭ la monto Poludnica en Malaltaj Tatroj kaj organizata de Liptova Esperanto-Klubo.

Se vi volas scii pli pri aliaj eventoj, vizitu [nian paĝon](#) aŭ ankaŭ retejon [Eventoj.hu](#) - internacian kalendaron de Esperanto-aranĝoj!



***Trankvilan kaj feliĉan Kristnaskon
kaj sukcesan novan jaron 2018
deziras al vi
redakta teamo de ĈEA-Retkomunikoj!***

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al retkomunikoj@esperanto.cz!